Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 5. de l' monato.

Leteradreso: Wien, I., Neue Burg, Telefono R-27-803

Manuskriptoj nur resendotaj kontraŭ reafranko.

Aŭstria Esperantisto

Jarabono komencebla ĉiumonate por Aŭstria ŝ 4.60, pagebla ankaŭ en part-pagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj svfr. 4.25 (9 poŝtrespondkuponoj) Ponumere 45 g (1 prk). Poŝtŝparkaso-konto aŭstria D 123.826.

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 7 (144) Korneuburg ĉe Wien, la 5. julio 1937. 14. jaro

Jubilea Kongreso de Esperanto.

Warszawa, 7.—15. aŭgusto 1937.

Aŭstria **Registaro** delegis la aŭstrian ambasadoron en Varsovio reprezenti Aŭstrion ĉe nia Jubilea.

Adreso: LKK nun havas belan ejon en Warszawa I, Al. Jerozolimskie 39/11.

Fervojaj **rabatoj**: sur polaj, ĉeĥoslovakaj kaj aŭstriaj fervojoj.

Kotizo: ŝo fr. 35.—, familiano 23.50, gejunuloj malpli ol 18-jaraj 15.—.

Glumarkoj: Por 2 respondkuponoj vi ricevas 50 belajn kongres-glumarkojn. Uzu ilin!

Saluto el Varsovio
Samideanoj, akceptu vi
Korajn salutojn el Varsovi'!
Akceptu ilin, tra l' tuta mond'
Disportu ĉien al nia rond'!
Diru, ke ankaŭ sur pola ter'
Batas la koroj por sankt-esper',
Ke ankaŭ tie, apud Vistul',
Renkonte brilas amik-okul',
Kaj etendiĝas fidela man',
Sonas: „Bonvenu, samidean'!“
Kvankam la nokto ĉirkaŭas nin,
Ni kredas: Tago brilos en fin',
Leviĝos fine la ora sun',
Kie nur steloj flagretas nun.
Ektondros laŭte triumfa kant'
Pri fina venko de l' Esperant'.
Do mi nur preĝas: Ho, donu Di',
Ke ĝin ekaŭdu ankoraŭ mi!

Tiel kantis nia s-ano **Antoni Grabowski**, la muziko de nia majstro, en sia verko „El Paradizo de Popoloj“, Grabowski, kiun oni prave nomis Pioniro de la Esperanta Poezio. Li mortis en Varsovio la 3. de julio 1921.

Niaj polaj samideanoj, kiuj jam depost pli ol unu jaro laboregas por ni, por prepari elegan Jubilean Feston por la esperantistaro kun nia ĉi-jara Universala Kongreso, vokas nin per la poemo de Grabowski al Varsovio, por travivi tie en ĉi-jara ESPERANTUJO nu semajnon, — neniu hezitu ŝin tuj anonci, ju iel povas ebligi sian ĉeeston en la Jubilea Kongreso!

Plifortigu **la kuraĝon de LKK per tuja aliĝo!**

Vizo: Ĉiu pola konsulejo donas al la kongresanoj senpagan vizon.

Vizitado **de la urbo**: Ĉiutage grupoj estos vidataj tra la urbo. Okazos ankaŭ ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo per tramo, buso kaj ŝipo.

Postkongresaj **ekskursoj:** Al la plej interesaj urboj de Polujo (Krakovo, Poznań, Gdynia, Vilno). Post la ekskurso estas rekomendata la vizito de pitoreskaj somerrestadejoj (Zakopane, Hel, Druskieniki) en la sudo de Polujo, kiun okupas granda montaro. En la nordo estas Gdynia ĉe Balta Maro, urbego mirakle konstruita dum 10 jaroj, kun la plej moderna haveno kaj multaj konataj marbanlokoj en la ĉirkaŭaĵo. Oriente en Polujo troviĝas virgaj arbaregoj kaj lagoj.

Monaferoj: En Polujo ekzistas mona limigleĝo. Tial envojaĝante Polujon registrigu ĉe la limo vian monon, por ke vi ne havu malfacilaĵojn ĉe via reveturo.

Ĉiu kongresano ricevos **senpage** 240-paĝan **„Oran Libron“**, eldonitan de Literatura Mondo laŭ komisio de LKK.

Ne parolu tro multe, sed agu
Kaj por karto kongresa tuj pagu!

Ĉeestu la Honorigon de nia Majstro, nome oni enmurigos **memortabulon** en la domon, kie li loĝis kaj mortis ĉe strato Królewska 41 en Varsovio.

250 **policanoj** lernas nun en Varsovio nian lingvon.

Programo:

7. aŭg.: 15 h kunsido de IPK kaj LKK; 19 h Interkonatiĝa Vespero.

8. aŭg.: 9 h Diservoj: 12 h Solena Malfermo; 17 h Malfermo de 14. Kongreso de Blindaj Esperantistoj; 19 h Malfermo de Jubilea Ekspozicio; 20 h 30 Festo de Veteranoj.

9. aŭg.: 10 h Ĉe la tomboj de l'Majstro kaj Grabowski; 16 h Laborkunsidoj de IEL kaj UEA; 20 h Teatro a) „Consilium Facultatis“ (trad. Grabowski), b) Pola muziko, danco, kanto.

10. aŭg.: Fakaj konferencoj, laborkunsidoj; 20 h Literatura Vespero.

11. aŭg.: Pilgrimo al Bialystok.

12. aŭg.: Fakaj kunsidoj ktp., 20 h Kabaredo.

13. aŭg.: Fak- kaj laborkunsidoj; 21 h Internacia Balfesto.

14. aŭg.: 10 h Ferma kunsido; 20 h Adiaŭa vespero.

15. aŭg.: Libervola tago en Varsovio. Ekskursoj.

Ĉu vi fumas?

Ĉiuspecajn tabakojn vi povas aĉeti en Polujo, ankaŭ eksterlandajn.

Ne donu trinkmonon!

Ne estas kutimo doni trinkmonon aparte en restoracio, kafejo, taksio, fiakro. En hotelo demandu, ĉar plej ofte oni alkalkulas servokotizon al ĝenerala fakturo. Estas via volo, se vi lasos por la ĉambristino donacon.

Se vi soifos...

„Woda sodowa“ (sodoakvo) 5—10 groŝojn, kun citrona aŭ ĉeriza suko 15—20 gr. Bieron vi ne ricevos en kafejo sed en restoracio aŭ baro: malgranda 20—30 gr. Vi devas diri „angjelka jasnego“ (por blonda) „angjelka cjemnego“ (por bruna). Pli granda glaso „maŭe jasne“ aŭ „maŭe cjemne“. Plej granda glaso „duje jasne“ aŭ „duje cjemne“. Ne preterlasu viziti faman vinejon de Fukier sur Ĉefplaco de Malnova Urbo, kie vi trinku faman polan mielakvon kaj bonan vinon. La firmo jam ekzistas depost 1650.

Strat-trafiko.

Simpla bileto sur tramo 20 gr.; kongresanoj ricevos specialan rabaton. Aŭtobusoj laŭ la distanco 15, 20, 25 gr. Taksio malgranda po 40, pli granda po 50 gr. unu km. Fiakro 1 Zloty ĝis 3 km. — En tramon oni eniras malantaŭe kaj eliras antaŭe; fumado nur en la dua veturilo. — Sur la stratoj oni iru dekstre.

Alilandaj gazetoj, nome la gravaj, estas aĉeteblaj.

Ni **aŭstrianoj forveturos el Wien** la 6. VIII. nokte. Samideanoj el aliaj landoj anoncu sin, por ke ni povu komune vojaĝi al Varsovio sub mia gvidado. Steiner.

Antaŭkongreso en Praha
5.—6. aŭgusto 1937

Programo: 5. VIII. akcepto de la gastoj en la stacidomo (anoncu vian alvenhoron!). Vizito de la urbo. Amika vesperarangĝo. 6. VIII. Kunveno por honori la 50-jaran jubileon. Vizito al la urbdomo kaj akcepto ĉe la urbestro de Praha. Tagmangĝo. Vizito tra la urbo. Vespere 23 h forveturo al Varsovio.

Neniu speciala kotizo. Fervoja rabato por kongresanoj. Necesas nur informi pri la alveno kaj dezirita ĉambro (unulita jam por 5 sv. fr.).

Senpagajn broŝurojn kaj detalojn sendas Prepara Komitato, Praha 47, Uralské 9.

Ministerio de Komerco en Praha, ČSR, eldonis belan 12-paĝan gvidilon sub la titolo „Vizitu Ĉeĥoslovakion! Ĉeĥoslovaka esperantistaro vin atendas!“ kaj dissendis ĝin kun E.-cirkulero al la gazetredakcioj. — Ĝi agis same kiel la aŭstria Ministerio!

La kontraŭuloj asertas,

ke Esperanto estas artefaritaĵo, ne organe kreskinta, speco de homunkulo, kaj tial rifuzinda. Sed la samaj kontraŭuloj volonte uzas arte konstruitan aŭtomobilon, anstataŭ organe kreskintan ĉevalon, por pli rapide kaj pli komforte vojaĝi.

100-jara Jubileo de vaporŝipveturado sur Danubo en Aŭstrio.

La 13. de septembro 1837 la vaporboato „Maria Anna“ de Erste Donau-Dampfschiff-fahrtsgesellschaft faris sian unuan vojaĝon de Wien al Linz, la ĉefurbo de Supra Aŭstrio. 7. jarojn antaŭe la vaporboato „Franz II.“ estis farinta sian unuan veturadon de Wien al Budapest kaj de tiu tempo ĝiaj Danubo-kaj marvaporŝipoj veturadis ĝis Drenkova, Galaz, en la marojn trans la Danubo-enmariĝo al Istanbul, Trapezunt kaj Smyrna. Tiam oni rigardis la vaporŝipon rimedo superi vastajn spacojn, Danubo fariĝis vojo al Turkujo, al la oriento. La senperan kaŭzon al la trafiko okcideten donis la fondo de Bavaria Virtemberga Donau-Dampfschiff-fahrts-Gesellschaft, kiu intencis prizorgi la trafikon de Ulm kaj la evoluo de Donau-Dampfschiff-fahrts-Gesellschaft komenciĝis en ĉi tiu kunlaboro. La komuna celo estis, funkciigi seninterrompan kaj regulan trafikon sur la tuta linio de la ŝipebla Danubo.

La 11. sept. la nova ŝipo, kiu ricevis la nomon de la imperiestrino „Maria Anna“, venis el Budapest al Wien, salutata de l'bruo de la kanonoj. La geimperiestroj ĝin vizitis la sekvintan tagon kaj multe laŭdis ĝin. La vaporŝipo amplekasis 300 pasaĝerojn; la maŝino, fabrikita en Soho, havis 60 ĉevalpovojn. La 13. sept. oni levis la ankrojn kaj la unua veturado al Linz estis farita, kiu fariĝis sensacio, kvankam grandaj uraganoj faris gravajn malhelpaĵojn kaj la ŝipo nur alvenis la 17. sept. Du tagojn poste la ŝipo faris sian laŭfluan veturadon, kun pasaĝeroj, por kies amuzado zorgis muzikorkestro. Centoj de veturemuloj devis postresti, la homoj amasiĝis kaj eksterlandanoj prefere ricevis vojaĝbiletojn. Tiu ĉi veturado nur daŭris



Moderna ŝipo de DDSG sur Danubo.

9½ horojn dume la kontraŭflua veturado daŭris 55½ horojn.

En printempo 1838 la trafiko Linz—Wien fariĝis regula kaj dumvoje nur estis unu stacio, urbeto Stein. Grandaj malhelpaĵoj kun grandaj kostoj estis forigotaj: reguligo en akvoturno ĉe Grein, konstruado de pontoj ktp. Baldaŭ Danubo estis la preferata vojo por enveturo al Aŭstrio kaj baldaŭ ankaŭ evoluis vigla fremdulfrekvento, ĉar la belaĵoj de la regiono famiĝis. La idilia Danubovaporŝipo nuntempe tuŝas preskaŭ kiel saluto el antaŭaj romantikaj epokoj kaj mirinde akordiĝas al la fabelaj trezoraĵoj sur la bordoj, la disfalintaj ruinoj, altaj elstarantaj kasteloj, fieraj monaĥejpalacoj kaj la pitoreskaj urboj kaj vilaĝoj, kiuj tiel invitas al ripozo. Eks-kurs-kaj feriocelo tio nun estas. Danubo kun siaj modernaj, kun ĉiu komforto ekipitaj vaporŝipoj.

Je memoro al la unua veturado trenvaporŝipo, maskita kiel Maria Anna, kun la pasaĝeroj en tiamaj kostumoj, faris la 19. de junio la veturadon de Linz al Wien, akompanita de la plej moderna vapor-ŝipo de DDSG, la jubileanta ŝip-kompanio en Wien, „Johann Strauss“, sur kiu estis la Federacia Prezidanto, ministroj, ambasadoroj ktp. kiel gastoj. La prezidanto de DDSG iama vickanceliero **Emil Fey,** kavaliro de la pli alta ordeno milita „Maria Theresia-ordeno“, salutis la gastojn. Sekvis la kutimaj paroladoj.

Ĉe la bordoj de Danubo kaj en la urbetoj kaj vilaĝoj apud Danubo kiel ankaŭ ĉe la forveturo en Linz kaj la alveno en Wien multmila publiko atendis kaj salutis la du ŝipojn kun la gastoj.

Venu ankaŭ vi al Aŭstrio por viziti la belegan, historie faman, riveregon Danubon, la ravigan Wachau, almenaŭ same belan kiel Rhein.

XIX-a Kongreso de I. K. U. E.

Haag, Nederlando, 1.—6. aŭg.

Prez de Honora Komitato: Lia episkopa moŝto mons. J. P. Huibers, episkopo de Haarlem.

Honora Komitato: Altrangaj ekleziaj kaj ŝtataj personoj.

Kongrestemoj: 1) La katoliko en la publika vivo, 2) kunlaboro de IKUE kun A. M. I. C. (Apost. Maris Int. Conc.).

Kongresejo: Ridderzaal (Kavalira salonego).

Adreso: s-ro F. Marrevee, Hugo de Grootstr. 76, Haag.

Kotizo: 2½ ned. guld.; helpkong. 1 guld.

Teatraĵo: La biblia dramo „Jozef en Dotan“.

17-s Kongreso de SAT okazos 1.—7. aŭg. en Rotterdam, Nederlando.

14-a Ido-kongreso internacia, Paris, 10. — 14. aŭgusto.

Esperanto en la moderna vivo.

Bonega manifestacio.

Bedaŭre mi ne povis ĉeesti kaj pro tio mi estas devigata, uzi la raportojn de „Franca Esperantisto“ kaj „Heroldo de Esperanto“. Steiner.

La Konferencejo estis bonega, komforta, luksa kaj bone ekipita.

La laboroj estis tiom ampleksaj, ke ili necesigus pli longan daŭron kaj ĉiuj komisionoj plendis, ke la disponigita tempo ne sufiĉis por fintrakti la tutan laboron, malgraŭ tio ke por ni ne ekzistas lingvaj malfacilaĵoj, ke ĉio disvolviĝis glate kaj senskue kaj en minimumo da tempo sen perdo pro longaj interpretadoj.

Preskaŭ sentinterrompe oni laboris, samtempe en 4 salonoj. La konferenca libro antaŭinformis pri ili.

Inter la kunsidoj de la unuopaj sekcioj estis enŝovitaj pluraj komunaj kunvenoj kun „sensaciaj“ prelegoj. Estis bona ideo, ĉar tiamaniere la konferencanaro ĉiam denove renkontiĝis.

Kompreneble la vespera ekskurso sur rivero Seine, la malferma kunveno, la teatra vespero, la E.-filmo „Antaŭen!“ kaj la festeno unuigis la 600 konferencanojn.

Entute la Konferenco kolektis kaj prilaboris ampleksan materialon, kies plej valoran ekstraktaĵon oni intencas publikigi. La E.-agemuloj nun utiligu tiun materialon, por ke la laboroj ne estis faritaj vane. Jam montriĝis la unuaj fruktoj, aliaj certe sekvos.

La Konferenco ankaŭ pruvis, ke por nia movado estas pli utile labori anstataŭ disputi pri internaj aferoj, speciale pri pasintaj. Kio okazis, ne plu estas ŝanĝebla. Eraroj estis farataj antaŭ, dum kaj post la milito kaj ĝis la lasta tempo. Tio ne malhelpas, ke ni provu eviti similajn erarojn estonte. Anstataŭ formi unuecan blokon, firman rokon en la maro de multspeca kontraŭeco oni preferis kaj preferas disiĝi en multajn apartajn institucionjn kaj organizaĵojn. Tial vegetas multaj landaj kaj fakaj asocioj; tial preskaŭ regule havis deficiton la postmilita UEA, forspezante sufiĉe grandan kapitalon, kiun ĝi estus povinta bone eluzi por nia afero, ĝustatempe ekkoninte sian taskon unuigi sub sia flago (de UEA) ĉiujn kunlaboremajn organizojn, individuajn esp-istojn kaj laboremulojn; tiel ankaŭ vegetas gazetoj kaj eldonejoj kaj tial ankaŭ okazas en nia movado tiom da nenecesa akreco, tiom da malbonvolo, atakoj, intrigoj, tiom da envio, tiom da malamikaĵoj, kiajn oni emus serĉi ĉie aliloke prefere ol ĝuste en la E.-movado. Tial okazas, ke oni povas elimini el nia movado iujn altmeritajn pionirojn, kiujn pli juste oni devus protekti kaj provi kiel eble plej longe konservi. Tial ankaŭ multa laboro estas farata pluroble, per kio okazas konstanta perdo de fortoj, tempo kaj mono. Mirige estas, ke ni dum 50 jaroj en tiu rilato preskaŭ nenion lernis.

Se ni volas unuigi la homaron, ni devas komenci ĉe ni mem! Ni komencu, lasu flanke ĉiun luktadon, luktadon, polemikadon ktp. — Ni sekvu la vojon de IEL kaj lasu esti feliĉaj la apartiĝemulojn en aparta asocio!

Nia celo: En Zamenhofa spirito labori kun ĉiu kunlaboremulo por Esperanto pere de IEL!

Pri la Konferenco kaj ties rezultoj en la venota numero! Jam nun ni devas danki al ĉiuj kunlaborintoj unuavice al la ĝeneralsekretario Petit por la grandioza bonege farita laboro por Esperanto!

INFORMOJ EL AŬSTRIO

100-jar-jubileo de Societo de la kuracistoj.

Okaze de ĉi tiu malofta jubileo okazis en la universitato en Wien la promocio de la famaj profesoroj **Wagner-Jauregg, Eiselsberg** kaj **Hans Horst-Meyer** je doktoroj je „honora kaŭzo". Prof. Horst-Meyer ricevis sian dekan „Honordoktor-diplomon".

La **Ministro por Komerco kaj Trafiko** disponigis denove 2 milionojn da ŝilingoj por modernigo de ŝoseoj.

Aŭstrio. Bonega ideo de Oesterr. Verkehrswerbung (Varbadservo de Ministerio por Komerco kaj Trafiko) eldoni sur unu folio en la formato de nia gazeto varbilojn en E. kun 6 belegaj bildoj. Faldebla kaj aldonebla al ĉiu letero eksterlanden. Kiu deziras tiujn povas ilin havi ĝis 10 pecoj por 10 g (la afrankokostoj). Riceveblaj ĉe Esp.-Varbadservo por Aŭstrio, Wien, Neue Burg.

„Al Vieno dum ĉiuj sezonoj", 16-paĝa faldprospekto eldonita de Fremdenverkehrsstelle (Fremduloficejo) de Urbo Wien, VII., Mariahilferstraße 2, kun multaj bildoj kaj kun ora kovrilo (verŝajne je honoro al nia Jubilea!). Kontraŭ alsendo de 1 int. resp. kupono Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio sendos al vi po 1 gvidilo Aŭstrio (42-paĝa), Vieno kaj E.-varbilon Aŭstrio, Wien, Neue Burg.

Viena **Foiro** preparas jam nun novan E.-prospekton por la Aŭtun-Foiro (5.—12. septembro). Esp.-Varbadservo por Aŭstrio, Wien, I., Neue Burg, dissendos ilin.

Statistiko. En la familioj de la industrilaboristoj estas manĝata viando en kilogramoj pojare: Anglujo 37.8, Aŭstrio 33.7, Belgujo 33.3, Bulgarujo 30.3, Germanujo 20.4, Italujo 12.3 kaj terpomoj: Belgujo 277, Polujo 202, Germanujo 153, Ĉeĥoslovakio kaj Aŭstrio 114, Svedujo 108.

Ligno-eksporto el Aŭstrio altiĝis kompare al la pasinta jaro en la unuaj 4 monatoj je 22—37% en la diversaj lignospecoj.

200 **Skandinavaj** geedzoj, kiuj gastigis dum la somera tempo aŭstriajn infanojn, venis Vienon por granda revidofesto. Ili estis akceptataj de urbestro Richard Schmitz en la urbdomo kaj salutataj flanke de la registaro.

En **Klagenfurt** okazis la geedziga soleno de la filmaktorino Grete Moosheim kun la amerika milionulo Howard Gould.

„Aŭstria Aeroklub" ankaŭ ĉijare okazigis pentekostflugadon tra Aŭstrio, en kiu partoprenis 42 aviadilloj, inter ili 11 aŭstriaj.

„Budapesti Hirlap", grava hungara gazeto skribas: En Aŭstrio estas tia kvanto je demokrativ, kin reprezentas la absolutan certigon de la unua fundamenta kondiĉo de ŝtata vivo, nome de la politika sendependeco kaj memstareco.

Provpaĝo de „Tutmonda Adresaro de la esperantistoj".

AŬSTRIO.

Aŭstria Esperanto-Asocio, reprez. de IEL, Wien, XVII., Syringgasse 3.

Aŭstria Esperanto-Federacio, Wien, XV., Hollochergasse 55/9.

Mallongigoj por la Federaciaj Landoj de Aŭstrio: Burgenland (B), Karintio (K), Malsupra Aŭstria (MA), Salzburg (S), Stirio (St), Supra Aŭstrio (SA), Tirolo (T), Vorarlberg (V).

Bachl proksime al Linz (SA).

Poidinger Hans, helplabor., 51 (AEA).

Bisamberg proksime al Wien (MA).

Steiner Hugo, kortega konsil., Bundesstr. 154 del IEL.

Steiner Lothar d-ro, juristo, sama adr. (AEA).

Ebensee (SA).

Weisskirchner Friedrich, dentisto. del. IEL.

Edelschrott (St).

Kreutzer Michael, maŝinisto, 51; deĵoras en elektra centrejo kiel vartisto de akvaj turbinoj, elektraj generatoroj kaj kumitilaro. Apartenas kiel MA al AEA, AEF, IEL, UEA.

Gmünd (MA).

Waldhauser Hugo, ofic., Walterstr. 171 (AEA).

Graz (St). —

E.-Societo por Stirio, Schönaug. 6/II.

E.-Grupo „Emanuel Peltier" (IKUE), Sackstr. 16/II.

Ĝenerala E.-Societo, Marieng. 12, Arbeiterkammer (AEF).

Bartl Karl, ofic., Schönaug. 6/II (ES)

Biehler Wolfgang d-ro, Alberg. 13 (ES).

Hackl Karl, kolonelo, Radetzkystr. 6 (ES).

. . . . . .

. . . . . .

. . . . . .

Linz (SA).

Supra Aŭstria E.-Societo, Gasthof Stadtgut, Volksgartenstr. (AEA).

IEL-Junularo, sama adreso (IEL).

E.-Grupo „Estonteco Katolika", Kollegium Petrinum, Harrachstr. 7.

E.-Societo „Espero", Hofg. 3 (AEF).

Ahorner Josef, Waldeggstr. 61 (IEL-J).

Aufreiter Eduard, tajloro, Handel-Mazzettistr. 9/I (IEL-J).

Aumayr Grete, modistino, Harrachstraße 24 (IEL-J).

Aumayr Josef, librobindisto, grupestro de IEL-J., Goethestr. 27.

Diller Hilde, bankofic-ino e. p., Gesellenhausstr. 15 (SA).

Friess Nelda, ofic-ino de Fremdultrafikofic., Sophiengutstr. 23 (SA).

Gothmann Trude, ofic-ino, Landstr. 97 (SA, IEL-J) interŝanĝo de pm. kun ĉiuj landoj.

Haider Heinrich, direkt. de telefonofic., Vergeinerstr. 2 (SA).

Kugler Josef, poŝtĉefofic., del de IEL., anstataŭanto de l' IEL-regno gvidisto por Aŭstrio kaj landa gvidisto por SA, Dr. Holzknechtstr. 7.

Mraz Josef, fakinstr., Aubergstr. 43 (SA).

Petran Marie, tajlormastrino, Gürtelstraße 33/I (SA).

Sittner Hans, landa ofic., Tummelplatz 8 (SA).

Schnell Josef, meblisto, Eignerstr. 12 (SA).

Taurer Albert, instr., Untergaumberg 30 (SA).

Tröbinger Wilhelm, ĉefpoŝtmajstro, Waldeggstr. 3 (SA).

Wannek Karl, direkt., prez. SA, Weissenwolfstr. 31.

Zinecker Ernst, ŝipkonstruanto, Hühnersteig 12 (SA).

Ziras Franz, tapetisto, Kaiserstr. 25 a (SA).

. . . . . .

Wien.

Grupoj: . . . . . .

La aranĝo estos jena: Unue ordigitaj laŭ kontinentoj, en tiuj laŭ landoj, en tiuj laŭ lokoj, ĉiam alfabete. Unue estas menciataj la organizoj kaj la dike presitaj literoj donas la mallongigon, ekz.: Aŭstria E.-Asocio (AEA). La kostoj estas 1 svisa franko aŭ angla ŝilingo po adreso kaj sama sumeto por krome aldonitaj ĝis 8 vortoj. Ankaŭ 2 int. poŝtresp. kup. estos akceptataj, en Aŭstrio S 1.20 en poŝtmarkoj. La mono ankaŭ povas esti sendota al: „Aŭstria Esperantisto, Korneuburg" al la konto D 123.826 de Aŭstria Poŝtŝparkaso en Wien, aldonante 15 groŝojn por la elspezoj.

Imitinda: Jus aliĝis la **tuta grupo en Aarau,** Svislando, pagante por siaj 15 membroj kaj **E.-Klubo en Wien** kun 90 membroj, tiamaniere montrante al la cetera E.-mondo la gravecon de siaj organizoj.

Lasta anonctempo ĝis **30. de oktobro 1937,** ĉar la Adresaro aperos precize la 15. de decembro 1937. Por la malgranda sumeto vi ricevos ankaŭ la ADRESARON mem! La adreso: Int. Esperanto-Muzeo, Wien, Neue Burg, Aŭstrio.

Steiner, prezidanto.

EL LA MONDO

Novaj gazetoj:

Nederlando: „La Lumo-Portanto", mistika Kristaneco, Okultismo, Astrologio, Edukado k.p.; eld. Rotterdame Studcentro, Bergweg 308.

Belgujo: „Nova Tagiĝo", monata eldono. Red. Lode Cnops, Broekstr. 21, Heverlee.

Ĉinio: „Internacia Solidareco", dumonata organo de La Verdemularo. Aperas en Kanton.

Nederlando: „Kontakto", eld. Nederlanda E-Centro, Schiedamseweg 209 b, Rotterdam-W.

Hungarujo: „Katolika Stelo", Budapest, Géza-u. 4 félem.

Brazilio: „Gazeto de Ameriko", ĉiusemajna Tutamerika E.-Organo politike, religie, filozofie kaj naciece neŭtrala. Eld. Maria Jeda de Morais, Rio de Janeiro.

Nederl. Hindujo: „Nia Organo", de LEEN. Red. K. Gorter, Villa Henny, Poerwosari, Solo.

Jugoslavujo: „Bulteno", Beograd, reaperis post 4-jara paŭzo.

„La Semajno", red. Gerda Drotten, Bjerringbro. 4 paĝa, grandformata, multobligita kun bildoj.

„La Fabriklaboristo", organo de sekcio 16, laka grupo de F. L. E., Amsterdam, reaperis en junio. 4-paĝa, multobligita.

„Pioniro de Esperanto", monata organo de la laborista E.-Asocio de Norda Ameriko, P. O. Box 100 Station „K", New York City, aperis en februaro, 8-paĝa multobligata kun desegnaĵoj.

Anglujo. En Sheffield la tramistoj ricevis de la urbo la permeson porti la E.-insignon dum deĵoro. La grupo konsistas el 200 membroj. — Wien estis la unua urbo en la mondo, kie la tramistoj ricevis E.-insignon dum deĵoro (brakrubandon kun la verda stelo).

Brazilio. Nova gazeto „Internacia, organo monata de E.-Asocio de Rosario", 16-paĝa, kun bela kovrilo.

Danujo. 15 danaj radio-gazetoj publikigas regule la programon de la E.-dissendoj el la diversaj landoj.

Taskoj kaj celoj de Sociala Labor-Komunumo (SLK) en Aŭstria.

El Radio-parolado de iama ŝtatsekretario Hans Grossauer, gvidanto de SLK en Patriota Fronto, kun ties permeso.

En Tutlanda Konferenco de SLK, kiu okazis kelkajn tagojn poste, partoprenis 300 laborist-delegitoj. En ĝi ankaŭ parolis Federacia Kanceliero d-ro von Schuschnigg kaj Staatssekretario Zernatto kaj pro tio la parolado de ŝtatsekretario Grossauer vekis specialan intereson.

„ La jaroj 1933 kaj 1934 alportis ĝisfundan ŝanĝon en la politikan vivon de Aŭstrio. Laŭ la esenco de la aŭstria renovigmovado la politikaj partioj devis esti likvidataj kaj ankaŭ la intereso-reprezentantaroj de la laboristoj kaj de la aliaj sociaj klasoj elfunde devis esti aliigataj. Sed je tiu okazo la ŝtata gvidantaro sub kanceliero d-ro Dollfuss kaj d-ro Schuschnigg bone sciis, ke al la laboristaro devas esti donota ekonomie kaj politike tiu bazo, sur kiu ĝi povos vivi en la intereso de la ŝtato kaj en sia propra.

La reprezentado de la ekonomiaj interesoj por la laboristoj kaj dungitoj en la privatindustrio estis certigita en „Gewerkschaftsbund“ por la 5 profesi-ligoj „industrio kaj mineksploato“, „metiaro“, „komerco kaj trafiko“, „mono kaj kredito“, „liberaj profesioj“; por la „laboristoj kaj dungitoj en la agrikulturo kaj forsteksploto“ per la kamplaboristaro en la kadro de „Bauernbund“ kaj por la publikaj dungitoj en „Beamtenbund“.

La ĝisnun evoluo de Gewerkschaftsbund pruvis, ke la anoj de la ekonomiaj intereso-reprezentantaroj de la laboristaro, antaŭe diversaj laŭ mondpercepto kaj aliaj bezonoj, estas kunigeblaj sur komuna bazo. La sama okazis ankaŭ en Bauernbund kaj Beamtenbund.

La aŭstria laboristaro ĉiam kutime interesiĝis ankaŭ pri la politikaj okazaĵoj. Tiu fakto estis sufiĉe konata al la ŝtatgvidantaro. Sed estis necese, post la ekskuadoj en la jaro 1934, atendi ioman glatiĝon de la politikaj ondoj. Komence de 1935 jam povis esti aranĝata bazo por la politika laboro de la laboristaro, nome „Soziale Arbeitsgemeinschaft“ (SLK) en la kadro de „Vaterländische Front“ (Patriota Fronto; PF). En la ĉefestraron estis invititaj la reprezentantoj de la ĉeforganizoj, kiuj sin okupis unuavice pri la interesoreprezentado de la laboristaro kaj dungitaro, kompletigita per fidinduloj el la antaŭaj partioj.

Nun post dujara funkciado de SLK oni povas konstati, ke la intern-politika vivo de Aŭstrio ne plu estas imagebla sen ĝi.

SLK estas forta faktoro en la internpolitika vivo, ĉar ĝi per sia agado helpas konstrui la fundamentan ideon de la aŭstria renovigo, la ideon de la popolunueco. Pro la aparteco de la evoluo la politika influo de la aŭstria laboristaro ne okazis en tiu grado kiel tiu de aliaj popolpartoj. Al tiuj restis kiel ekz. al la kamparanoj kaj metiistoj la organizformo. La antauaj politikaj organizaĵoj de la laboristoj parte entute estis likviditaj, parte ili ne povis trovi lokon en sia antaŭa formo en la nova politika vivo de Aŭstrio.

La laboristaro do post 1934 ne posedis politikan organizformon por la kunlaboro politika, al kio ankoraŭ venis la libervola flankerestado de grandparto de la iama socialisme organizita laboristaro. Tiu ĉi malsama politika pozicio de diversaj popolpartoj ne permesis la starigon de la internpolitika ekvilibro en la tutpopolo en tiu grado, kiu konformus al la formado de popolkomuneco en la senco de la renovigideo de kanceliero d-ro Dollfuss. Aliflanke ne estis en la intereso de la ŝtatgvidantaro, scii grandajn partojn de la popolo daŭre flanke starantaj.

Estas unu el la ĉeftaskoj de SLK, forigi la barojn al la necesa evoluo kaj certigi la politikan ekvilibron inter la popolpartoj. La ĉefa rimedo estas

kolektado de la tuta laboristaro

sen konsidero pri la politika pasinteco de la unuopa laboristo. Per tio ankaŭ la unua antaŭkondiĉo al la konstruo de la popolkomuneco estas donita.

Sed SLK estas ankaŭ forta faktoro en la vivo de PF, ĉar la en la ŝtata vivo estinta manko de la tutlaboristaro respeguliĝis dum la du unuaj evolujaroj en la vivo de PF. Ankaŭ en la vivo de PF mankis tiam la interna kunlaboro de la laboristaro. Ĉiu speco de organizaĵo estas malbone fundamentita, se ne la kunlaboro de ĉiuj okazas el ili mem. Tio ankaŭ estas aplikebla al PF kiel sola faktoro de la politiko en Aŭstrio.

Per la kolektado de la tutlaboristaro sur la bazo de PF, evitante apartajn tendencojn, SLK enigas la laboristojn en la politikan vivon en PF, kundecidigas la laboristojn en la politika laboro kaj per tio kreas la komunecon de ĉiuj ankaŭ en PF. Per la laboro de SLK en la laboristaro ĉiam pli da ĝi trovas la vojon al sama politika volo.

Per tio SLK mem fariĝis forta faktoro en la politika vivo de la aŭstria laboristaro. Je la komenco de la SLK-laboro grandparto de la laboristaro staris, kiel kontraŭ la ŝtato, ankau malkonsente kaj suspekte kontraŭ SLK. Miloj kaj miloj tiam pensis ŝirmi la rajtojn de la laboristoj en formo de kontraŭleĝa laboro, pensis tiamaniere kapabli, forigi la novan ideon kaj per tio la novan ŝtaton. Dum la agado de SLK multo ŝanĝiĝis. La malmilda vivo, la realaĵoj de la vivo estas pli fortaj ol iluzioj.

La nova ŝtato konstruas, ĝi konsolidiĝas, novaj politikaj danĝeroj por la laboristaro el la nacia direkto montriĝas, por kiuj la kontraŭleĝa laboro kaj la flankestarado de la laboristoj nur signifus helpadon. Sed la laboristaro estas sufiĉe klera por scii, ke ĝi ne devas helpi al ĉi tiuj celadoj. Miloj kaj miloj aŭstriaj laboristoj ekkomprenas, ke tia granda popolparto, kia estas la laboristaro, devas fari sian leĝan politikan laboron, por ankrigi sian rajton kaj certigi novan rajton. La politika vivo de ŝtato pulsas, ne haltas, ankaŭ tiam, se la unuopulo ne kuniras. Kiu restas flanke de la popolo, estas forŝovata, la politika vivo okazos sen li, ja, se la flankestarado daŭras tro longe, eĉ kontraŭ li. Sed la sana sento de la aŭstriaj laboristoj superas. Sen la komprenema kunlaboro de grandaj rondoj el la laboristoj la ĝisnuna evoluo de SLK ne estus ebla.

1200 organizlokoj estas en Aŭstrio kaj en ili laboras 12.000 laborist-fidinduloj por la afero de la laboristaro.

Preskaŭ ĉiutage novaj organizlokoj estas fondataj. Ĉi tiuj 12.000 bravaj fidinduloj de la laboristaro en SLK trankvile iras sian vojon kaj efektivigas grandparte la duan ĉeftaskon de SLK:

La atingon de la plena kundecidrajto por la aŭstria laboristaro en la korporacioj. En centoj da komunum-estraroj kaj aliaj korporacioj SLK aranĝis la kundecidon de la laboristoj kaj tiamaniere ekiris la vojon, kiu sole kondukas al la politika egaleco de la laboristaro en la aŭstria popolkomuneco. La konsilejoj ĉe la organizlokoj zorgas ankaŭ pri la aferoj, kiuj premas la laboriston. Ne al ĉiuj oni povas helpi, sed al multaj kaj 10.000 da helpon serĉantoj en urbo kaj sur kamparo uzis ĉi tiujn konsilantejojn.

La vojo de SLK estis ŝtona. Ne ĉiu havas komprenon por la laborista demando, kiun ĉi tiu meritas.

Ŝtat—kaj Front—Gvidisto d-ro Schuschnigg kelkfoje montris al SLK kaj al ties amikoj la klaran direkton:

„Amikoj, ni apartenas unu al la alia!“

Ĉi tiujn vortojn la kanceliero kaj Front-gvidisto direktis dum la unua Viena Lando-Konferenco al la aŭstriaj laboristoj. Gravaj vortoj, kiuj esprimu la ligitecon de la front-gvidisto kun la aŭstria laboristaro, vortoj, kiuj esprimas klare kaj sendube la volon de la front-gvidisto, ke ankaŭ la laboristoj kiel samrajtaj civitanoj havu la saman parton en la konstruo de la nova ŝtato. La unuan fojon tiuj ekaŭskultis, kiuj interne staris kontraŭ tio, kio devis alporti la egalrajtecon de la laboristaro en la kadro de la popolkomuneco.

Kaj nun dua grava deklaracio de l'kanceliero, direktita senpere al la laboristaro kaj dungitaro: „Mi salutas en ĉi tiu momento trans ĉi tiu salonego ĉiujn laborist-kamaradojn en la Patriota Fronto, speciale ankaŭ tiujn, kiuj nun staras en niaj vicoj kaj dum la amaraj februar-tagoj 1934 donis sian simpation al la batalantoj sur la alia flanko. Mi scias, ke ilin unuigas kun ni unu volo: la volo al Aŭstrio. Pro tio nenio kapablas ekskui mian nepran fidon al la aŭstria laboristaro en ĝia tuteco. Speciale en PF. pere de SLK ni pretigis la vojon al plej intima kunlaborado.“

Ĉi tiuj vortoj de la front-gvidisto trovis la vojon eksteren, malproksime trans la limojn de ĉi tiu ŝtato kaj la ŝtatgvidisto konstruas kun ili la lastan ponto-kolonon al la tuta laboristaro de l'patrolando. Eĉ la plej nerepacigemulo ne povas interpreti ĉi tiujn kancelierajn vortojn kiel simplan repaciĝfrazon kaj la laboristoj en la urbo kaj sur la kamparo ankaŭ sentis kaj sciis: Ĉi tiuj vortoj estas la voko al la aŭstriaj laboristoj, enigitaj en la politikan situacion, la sincera voko al la samrajta laboro.

SLK ankoraŭ longe ne atingos sian celon. Multo ankoraŭ estas farota. Multo ankoraŭ ne estas tiel, kiel ĝi povus esti, tion ni scias kaj tion scias la laboristoj. Sed kio estas farota ankoraŭ, ne povos esti farata, se la laboristaro en sia tuteco ne kunkonstruos je la nova ŝtato kaj per tio ne kunkonstruas je sia propra sorto, kiu estas plej intime ligita kun ĉi tiu ŝtato je prospero kaj malprospero.

Edmund Zscheile, la mondvojaĝanto rakontas.

S-ano Zscheile venis kun sia edzino por viziti la Int. E.-Muzeon.

Steiner: „Bonvolu rakonti ion pri via iama vojaĝo.“

Zscheile: „En la jaroj 1923—1933, do dum 10 jaroj, mi piede tramigris la plej gravajn landojn en ĉiuj terpartoj de la mondo. Dum ĉi vojaĝo mi ellernis la lingvon Esperanto en Silberio kaj ĝi faris al mi bonan servon.“

St.: „Dum ĉi tiu longa tempo vi certe havis multajn interesajn travivaĵojn?“

Z.: „Mi ekmigradis el mia naskiĝurbo Leipzig, provis veni al la sudo tra Svislando, Italujo kaj Jugoslavujo, sed pro la senvalora inflacia germana mono mi ĉiam devis reveni al Aŭstrio. Fine mi renkontis en Wien amikon el mia patrolando, kiu poste migradis kun mi dum 3½ jaroj. Bedaŭrinde oni mortigis lin en Manĉurio, kiam li kundefendis vilaĝon kontraŭ Hongusoj (rabistoj). El Wien ni migradis laŭ Danubo al Bulgarujo kaj de tie al Konstantinopel. Tie ni estis arestitaj dum 8 tagoj, sen ricevi nutraĵon. Mi devis vendi mian violonon, — la policisto estis la peranto, kiu ankaŭ aĉetis por ni panon. Liberigitaj ni demandis la policprezidanton, kial oni nin malliberigis, kaj tiu respondis en plej bona Berlin-a dialekto „Se vi estus batinta la policiston en la vizaĝon, li ne estus arestinta vin.“ — En Grekujo ni estis gastoj de r a b i s t a r o, kiu volis nin persvadi, haltigi ekspres-trajnon, en kiu devis veni ministroprezidanto Papaanastasius. Kompreneble ni ne konsentis ĉi tiun negocon. Ili fakte haltigis la trajnon, sed la ministro ne enestis. Oni nin poste lasis foriri kaj ni rakontis la proponon al la ministro, kiu tre afable nin gastigis kaj donis bileton por ŝipo al Egiptujo.

St.: „Ĉu vi tie renkontis esp.-istojn?“

Z.: „Laŭlonge de Nil-riverego ni migradis dum la plej malagrabla somervarmego tra Egiptujo, Nubio al Sudano.“

St.: „Ĉu vi tie renkontis esp.-istojn?“

Z.: „Tiam mi ne ankoraŭ estis esp-isto, nur en Siberio mi lernis la lingvon.“ De Sudano la angloj nin resendis al Egiptujo. Ni havis la intencon sub ĉiuj cirkonstancoj migri al Abesinio, ĉar ni havis inviton de Ras Tafari, tiama regento kaj posta Negus de Abesinio, kun kiu ni interkonatiĝis antaŭe en Kairo. Tial ni migris sen scio de la angla guvernestro 300 km en la grandan dezerton de Nubio. Tie beduinoj devigis nin rajdi kun ili al la Scheich (tribestro), kiu akceptis nin afable kaj kiel gastoj, donante grandan feston, al kiu li invitis najbarojn el la diversaj monddirektoj. Kun ili ankaŭ venis — ne invitite — la policestro de Abou-Rakib, la plej proksima egipta-sudana limstacio. Laŭ telegrafa ordono li devis kunvenigi nin al Egiptujo. Dum la reirado ni havis la maloftan avantaĝon trovi tombon el la antikva regno de la Faraonoj, el la epoko ĉirkaŭ la jaro 3000 antaŭ Kristo. La tombo enhavis 5 bone konservitajn mumiojn. La mumiojn ni ne povis kunpreni, ĉar estas malpermesite preni ilin el la tombo. — En Port Said ni ricevis sur germana ŝipo la altrangan postenon de „telerlavistoj“ kaj tiamaniere ni veturis ĝis insulo Sumatra, Nederlanda Hindujo. Ni havis la saman sorton kiel en Sudano. La nederlanda registaro resendis nin al Egiptujo, ĉar ni ne havis la garantian sumon por la envojaĝo. — Sed ni ne perdis nian bonhumoron kaj marŝis post alveno en Egiptujo (Suez) tra la dezerto Sinai al Palestinio. En la dezerto ni havis aventuron, kiu ŝajnis finiĝi malbone. Komence de 1925 estis eksterordinare granda malvarmego. Ni dormis la 21. januaro en. la honortendo de malgranda beduin-tribo. Kiam mi matene ekvekiĝis, 5 de miaj gastigantoj staris antaŭ mi. Ili havis en la manoj neĝon, gustumis de ĝi kaj vokis seniluziigite „Misch-dschugar“ (ne sukero). Nun mi devis klarigi al la naivaj naturinfanoj de kie la neĝo venis, sed ne trovis sufiĉan kredon. Post duonhora sekreta konsilado la Scheich anoncis al ni, ke ni estas malbonaj homoj, kiuj alportis la neĝon kaj pro tio oni mortpafos nin post la „Sur“ (vesperpreĝo). Pri fuĝo ni ne povis pensi, do ni lasis ilin en timo antaŭ ni — ili opiniis, ke ni estas sorĉistoj. Mi prenis mian nigre binditan migradlibron kaj komencis reciti kun teruraj grimacoj kaj timiga voĉo. Mia amiko akompanis miajn sorĉaĵojn per monotona melodio sur sia buŝ-harmoniko. Post 3 horoj venis la Scheich. Mi klarigis al li, ke la neĝo estas signo de Allah kaj signifu, ke Abd-el-Krim gajnos la militon en Maroko. Tuj la Scheich eksaltis, kunvokis siajn virojn, diskonigis mian antaŭdiron kaj ordonis, ke oni buĉu je nia honorigo ŝafon. Vespere li aranĝis festeton kaj invitis nin resti ĉe li ĝis kiam Abd-el-Krim estos gajnonta la militon. Sed mi mem ne havis tiom da fido al mia propra antaŭdiro, pro kio mi diris, ke mi devos kiel germana generalo, kiu promesis mian subtenon al Abd-el-Krim, iri por helpi lin. Tion komprenis la Scheich kaj proponis nin akompani. Daŭrigota.



Luxor (Egiptujo) Memnon-kolosoj sur la vojo al la valo de la reĝotomboj.



Piramido de Cheops kaj granda sfinkso proksime al Giseh (Egiptujo).

Oesterreichische **Verkehrswerbung** (Varbadservo de Ministerio por Komerco kaj Trafiko) **depost 1. de julio** oficas **Wien, III., Am Heumarkt 10.**

Esperanto - Varbadservo por Aŭstrio, Wien, I., Neue Burg, nedependa de iu organizo, servas nur pere de Esperanto al Aŭstrio. Ĝi donas ĉiun informon koncerne E-on kontraŭ respondafranko kaj sendas la diversajn E.-gvidilojn „Aŭstrio“, „Wien“ ktp. kune kontraŭ 1 resp. kupono por kovri la elspezojn.

E.-ekspozicio okazos en la kadro de „Ekspozicio de Moravia Slovakio en Uh. Hradiŝte, ČSR, de 20. junio ĝis 15. aŭgusto. Petu esperantaĵojn de Vystava Slovacka en Uh. Hradiŝte per simpla karto.

Oesterr. Verkehrsbureau, Wien, I., Friedrichstraße, helpas vin en **ĉiuj vojaĝaferoj.**

Intern. Esperanto-Lernejo.

De 17.—26. julio en Silkeborg okazos Int. E.-Lernejo, en kiu prelegos Setälä (Finnlando), Wekerle (Hungarujo), inĝ. Turner (Britlando), verkisto Justesen (Danlando) k. a. Turnu vin al Stig. B. Skole „Kornmod“, Silkeborg, Danlando.

„Dansk Esperanto Blad“, nova adreso K a r i s e, Danlando.

Jubileo.

Julius Glück, la konata propagandisto kaj instruisto, kiu multajn jarojn laboris por E. en Aŭstrio kaj kiu kun d-ro Sós eldonis la konatan lernolibron, festis sian 60-an naskiĝtagon. Li ankaŭ baldaŭ festos la 30-an datrevenon de sia esperantistiĝo kaj nun preparas sian 250-an E.-kurson. Nuntempe s-ano Glück laboras en Nederlando. Mi deziras al li multan sukceson kaj, ke li fariĝu 70-jarulo en sama freŝeco kaj bonhumoro kiel sian 60-an. Glück estis mia E.-instruisto. Kara amiko, multan feliĉon kaj ĝis revido! Via Steiner.

Danubo-Festsemajno Linz—St. Florian—Steyr.

El la Radio-parolado de kort. kons. Hugo Steiner, la 25. de junio 1937.

Kiel mi danku al la oficisto en la trafikoficejo, kiu erare sendis min el Svedujo semajnon tro frue al Salzburg al la festludoj. Mi nun estis en Salzburg kun plena entuziasmo kaj oni konsilis al mi, intertempe ĝui la pejzaĝon, ĉar la festludoj nur komenciĝos post unu semajno. „Aŭ vi eble veturu al Bruckner-festo en Supra Aŭstrio, al Linz, kiu jam komenciĝos postmorgaŭ. Tie vi povos aŭskulti bonegan muzikon, internaciajn artistojn, la Vienajn filharmoniistojn!"

Do mi veturis al Linz. Dumvoje en la trajno oni parolis pri la komencota Brucknerfesto. Baldaŭ ni estis en Brucknerlando. Malproksime dekstramane bluiĝis la montoĉenoj. „Tie estas Salzkammergut, situas Bad Ischl, St. Wolfgang, Gmunden, mia hejmlando" kunvojaĝantino diris. Ofte mi jam aŭdis pri la sorĉo de Salzkammergut, pri ĝiaj unike belaj alpolagoj, pri Lago de Traun, de Hallstadt kaj Wolfgang, pri Traunkirchen, Ebensee, Goisern. Kaj la „blankan ĉevaleton" ja konas ĉiu el ni. Mi veturis al Linz, rezervigis al mi biletojn por la Bruckner-fest-aranĝoj, kiuj du tagojn poste komenciĝis, trinkis mian kafon supre sur Pöstingberg, de kie mi ĝuis belegan rigardon trans la ĉarman Danubourbon Linz tre malproksimen ĝis la grandioza regiono de la Alpoj. Vespere mi reveturis al Gmunden. Ĉi tiu vespero, plena de suda ĉarmo de la alpa pejzaĝo, restos al mi neforgesebla. Sur la bordoj de Lago de Traun mi promenadis. Lumomaro, vigla vivo ĉirkaŭ mi, muziko kaj gajaj homoj, ĉiuj en la multkoloraj kostumoj naciaj, „Dirndl" kaj ledopantalonoj mallongaj, kiujn surhavas ĉi tie enlandanoj kaj gastoj. Sed mi ankaŭ rigardis al la malluma lago, sur kiu boatoj kiel vaglumoj preterrapidis, kiun superas la potenca Traunstein-monto. Ke ĉi tie estas unu el la plej belaj lokoj en la mondo pruvis al mi la sekvinta tago. Nun mi vidis la lagon brili en hela sunlumo, ĉirkaŭ la mirinde bela montarregiono de Salzkammergut, vidis la fierajn kastelojn de Virtemberg kaj Cumberland, kiujn ĉi tie regnestroj konstruigis. Sed nuntempe en ili regas multa vivo; ĉi tie kuniĝas la junularo el la tuta mondo; bruniĝintaj junuloj renkontis min en la belegaj parkoj, kiuj enhavas tenisludejojn kaj gimnastikejojn kaj belegajn banejojn ĉe la lago. La pompo de iama riĉeco unuiĝas kun plej moderna komforto en la kasteloj. Esp-hejmo tie en Gmunden.

Tute sorĉita mi estas de la beleco de ĉi tiu regiono. Unu semajnon mi ankoraŭ restis en Brucknerland ĉe Brucknerfesto. Kiu deziras tute kompreni Bruckner, devas aŭskulti lian muzikon en lia patrujo, prezentitan de la plej bonaj muzikistoj en la mondo, de Vienaj Simfoniistoj kaj Filharmoniistoj. Mi neniam forgesos la prezentadon en la abatejo St. Florian proksime al Linz, kie ĉi tiu muzikheroo verkis antaŭ kelkaj jarcentoj, ĉi tiu belega konstruaĵo, kiu tion montras en jubilantaj surteraj formoj, kion Bruckner gloris en sia muziko, kiu nun eksonis kaj en mirindaj harmonioj unuiĝis kun spaco kaj pejzaĝo.

Belaj rememoroj? Tute ne, tion oni devas travivi! Tial veturu al Brucknerfesto al Supra Aŭstrio! La nunjara festo sub la titolo „Festsemajno ĉe Danubo" okazos inter 18.—21. de julio kaj komenciĝos per serenado, dum kiu verkoj de Josef Haydn, Anton Bruckner, W. A. Mozart, Franz Schubert kaj Hugo Wolff estos prezentataj. La 17. de julio en Linz Vienaj Simfoniistoj prezentos sub la fama



Fervojo al sur Pöstlingberg.

amerika direktanto Eugene Ormandy la okan simfonion de Beethoven kaj la kvinan de Bruckner. La 18. julio la festo okazos en St. Florian: solena kantata meso kun Missa solemnis de Bruckner, en kiu kunaktoras Vienaj Simfoniistoj kaj la abateja ĥoro de St. Florian sub direktado de Adolph Trittinger, poste orgenkoncerto de la fama orgen-majstro Franz Schütz; en la marmorsalonego prezentado de ĥorverkoj el la junepoko de Bruckner, poste Vienaj Simfoniistoj prezentos la duan de Bruckner sub direktado de ĝeneralmuzikdirektoro Hans Weisbach el Leipzig. La 19. junio veturado al la memorlokoj pri Bruckner kaj granda koncerto en la antikva, ege interesa industria urbo Steyr de Vienaj Simfoniistoj, nome 7. simfonio de Franz Schubert kaj la VI-a de Bruckner.

La 20-an julio veturado sur Danubo kontraŭflue ĝis Wesenufer, interrompota dum la reveturo en Wilhering, kie post vizitado de la abatejo okazos popularaj prezentadoj kaj diversaj amuzaĵoj. Vespere aparta surprizaĵo sub la titolo „Junularo Supra Aŭstria salutas"!

Fino de la festsemajno la 21. julio en festhalego en Linz kun koncerto de Vienaj Filharmoniistoj sub la direktado de Oswald Kabasta — III-a simfonio de Bruckner kaj II-a de Franz Schmidt.

La kontraŭuloj asertas,

ke Esp. ne povas vivi. Sed ĝi jam vivas en siaj kongresoj kaj konferencoj; ĝi vivas vigle en niaj gazetoj, en miloj da kluboj kaj grupoj kaj rondoj; ĝi vivas en miloj da libroj; ĝi vivas en centmiloj da prospektoj kaj broŝuroj; ĝi vivas en milionoj da leteroj; ĝi vivas — antaŭ ĉio — en la koroj de siaj fervoraj adeptoj kaj propagandantoj tra la mondo, el kiu ĝi jam ne estas elŝirebla.

Brazila Poŝto eldonos Esperanto-poŝtmarkojn okaze de nia Jubilea. Koregan gratulon al dro J. Marques dos Reis, brazila ministro por Trafiko kaj Publikaj Laboroj!

Kontraŭ la ĝisnuna kutimo nur prezenti simfoniajn verkojn de mortintaj majstroj la komitato ĉifoje metis honoran monumenton al la plej eminenta vivanta simfoniisto Franz Schmidt.

Por ebligi al vastaj rondoj je moderaj prezoj kunfesti la Festsemajnon, O.-Oe Landesverkehrsamt en Linz eldonas antaŭpagitajn biletarojn por sestaga restado kaj partopreno en la diversaj aranĝoj. Kontraŭ la bileto por Danuba Festsemajno vi ricevos rabaton sur la aŭstriaj fervojoj, ŝipkompanio, poŝt- kaj aliaj aŭtobuslinioj ktp. Informojn donas O.-Oe Landesverkehrsamt, Linz.

UEA — IEL.

UEA, Genève en sia jurnalo „Esperanto" (majo) publikigis artikolon kelkpaĝan sub la titolo „Disrompo de la neŭtrala movado".

IEL, Heronsgate respondis detale en sia organo „Esperanto Internacia" (Junio) kaj en „Heroldo de Esperanto" (Nro. 25).

Por fari al vi la ĝustan bildon pri la afero, legu ĉiu ambaŭ gazetojn!

Sed plej bone kunzorgu, ke la ĉiamaj luktadoj en la esperantistaro fine ĉesu, por ne mem mortigi la movadon, kion ĝis nun la malamikoj de Esperanto ne sukcesis.

La redakcio.

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.

Neue Burg, Aŭstrio.

ricevis en la lasta tempo multajn vizitojn, i. a. f-ino **Marie Marvingt** el Nancy, pioniro deE. en Francujo kaj de sanitara aviado, kavaliro de Franca Legio de Honoro ktp.; **Edmund Zscheile** kun edzino el Leipzig, fama kiel piediranto tra la mondo en la daŭro de 10 jaroj; fratinoj **Tini kaj Lucie Weijer** el Steeg, Nederlando, kiuj sur tandemo jam nun veturas al la 29-a en Varsovio.

Donacoj:

Grandan donacon faris inĝ. Karl von Frenckell el Dresden, kiu nun antaŭ sia forveturo hejmen al Finnlando, sendis 80 kg keston kun belege bonditaj libroj kaj gazetoj.

Krome donacis en junio:

Steierm. Landes-Bibl., Graz, Muusses-E-Bibl., Purmerend, Nederl. J. V. Dolinsky, Turĉiansky, ČSR D-ro Williams, Papua, Aŭstralio, Luz-Lumo, Mexico, Ameriko.

Polaj Stataj Fervojoj eldonis 12-paĝajn gvidlibretojn, vere belajn kun interesaj bildoj, nome pri **Varsovio, Krakovo, Vilno** kaj **Gdynia.**

La esperantistaro devas gratuli pro ĉi tiuj vere elegantaj kaj noblaj varbiloj!

Radio Hilversum, Nederlando.

La **24. julio** (tempo laŭ la Radio-gazetoj) okazos **tuthora Esperanto-elsendo** kun orgenludo, paroladoj en nederlanda kaj E.-lingvoj. Bonan akcepton raportu al Radiostacio Vara, Postbus 50, Hilversum.

PILGRIMU AL POLLANDO!
VENU AL VARSOVIO!

La Festludoj en Salzburg.

La mirinde bela, miljara urbo Salzburg, fabelo de l'sudo, translokita en nordan alpobelegon, situita en la koro de Eŭropo, estas certe kiel neniu alia urbo predestinita al aranĝo de festludoj. Feststratoj estas ili, tra kiuj la fremdulo migras, kun pompaj preĝejoj, luksaj palacoj kaj kasteloj, altaj malvastaj de murarkoj pitoreske supervolbitaj stratetoj, kiuj subite finiĝas sur vastaj de valoraj putoj ornamitaj placoj aŭ kiujn kontraŭas la potencaj ŝtonvandoj de Mönchsberg-masivo, la domvicojn al nova direkto devigantaj. Mirakloj de la naturo, de la arto formas unusolan grandiozan ekspozicion, kiun oni neniam povas rigardi ĝissate! Kaj ĉi tiu pitoreska kadro estas tio, kio levas la festludojn super ĉiuj similaj aranĝoj en aliaj urboj, kiu el mallongaj scenejiluzioj formas neforgeseblajn arttrarivaĵojn, kiu kiel fea magneto igas la fremdulon ĉiam revenanta gasto.

La ideo pri la Salzburg-aj Festludoj estas malnova; ĝi altrudiĝis depost ĉiam al la artospertuloj. La unua Mozart-festo jam okazis en 1842, al kiu sekvis en intertempoj de kelkaj jaroj similaj aranĝoj, el kiuj ni nur citu: 100-jara naskiĝtagfesto de Mozart en 1856, la muzikfesto kun la starigo de Mozart-dometo sur Kapuziner-monto 1877 kaj la centjarfesto de Don Juan de Mozart 1887, je kiu okazo la unuan fojon oni priparolis la demandon de ĉiamaj festludoj. Ĉe la muzikfesto en 1901 Lilly Lehmann kantis, 1904 estis la vico al Mozart-operoj kun nuarangaj solistoj, 1906 Gustav Mahler, Richard Strauss kaj Felix Mottl estis direktantoj, 1910 la unuan fojon ludis la orkestro de Vienaj Filharmoniistoj, 1914 la mondmilito faris al ĉiuj planoj kaj preparoj subiran finon, 1918 „Festspielhausgemeinde" fondiĝis, 1920 la unuan fojon sub la inscenigo de Max Reinhardt estis prezentita la intertempe mondfama fariĝinta ristera ludo de Hoffmannsthal „Ĉiu", kiu nkoraŭ nuntempe estas la ĉefatrakcio de programo.

La repertuaro poste enhavis krom kontertoj ankaŭ oper-prezentadojn, katedralaj subĉiel-koncertojn, serenadvesperojn, dramo-prezentadojn kaj la famo de la festludoj baldaŭ estis internacie tiom indigata, ke ĉiu artisto en la tuta mondo taksis tiel grandan honoron esti invitata kunakori en la festludoj.

Tiel okazis, ke majstro Reinhardt, la nekronita reĝo de Salzburg, kiel li ŝatas esti nomata, sukcesis altiri la eliton de la plej famaj teatroj al siaj prezentadoj kaj fari la Salzburg-ajn Festludojn afero de la tuta Eŭropa kulturo.

La festludejoj mem estas vidindaj. Unue la Domo de la festludoj, miraklo, kiu montras pasintan kaj modernan artojn plej feliĉe unuiĝintajn, nobla monumento de aŭstria arto kaj tekniko. Tute unika la subĉiela rajdejo kun la preskaŭ 100 loĝioj, enigitaj en la ŝtonmuron de Mönchsberg, en kiu siatempe estis aranĝitaj bestkurĉasadoj, kavalirturniroj kaj kiu nuntempe estas uzata por la subĉielaj prezentadoj. Krome la iama vintrorajdejo kun la kolosa plafonpentraĵo de Rottmayer! ĝi estis transformita al urbfestsalonego por kongresoj kaj reprezentaj



Prezentado de „Ĉiu" antaŭ la katedralo.

festoj. Sed la plej belan teatrosalonegon en la mondo reprezentas la Katedral-placo, kiu estas malvaste ĉirkaŭita de la solena harmonio de suda konstruarto kaj al kiu la monumenta sanktejo, la alte elstraranta fortikaĵo Hohensalzburg faras la supertere belajn kulisojn.

La forton kaj la abundon al artista kreado oni ankaŭ ne povis forpreni de la malgranda Aŭstrio... Kaj Salzburg, kiu estis jam de antikvaj tempoj kultura centro, pruvis per siaj festludoj, agado senkompara, ke, kie estas la volo, ankaŭ la vojo estas trovebla, kiu kondukas al sukceso.

Do ĉijare nepre ankaŭ al Salzburg!

EL LA LEGANTARO

Al Varbadservo de Ministerio por Komerco kaj Trafiko en Wien venis jena letero:

„Ni dankas por via letero kaj la senditaj E.-broŝuroj, kiujn ni kun plezuro disdonis inter niaj membroj. Ni uzas la okazon, por esprimi al vi nian specialan rekononon por la eldonado de ĉi tiu bonega materialo. ... **Brita E.-Asocio, London.**"

„... Tial ni decidis peti vin, ke vi intervenu ĉe la kompetentaj instancoj por transdoni nian deziron, ke venontan aŭtunon la E.-kursoj el Radio-Wien okazu ĉiusemajne inter la 18-19 h, por ke per ĝi ni povu samtempe lerni la **germanan** kaj la E.-lingvojn. Ne miru, se ni substrekas la vorton „germanan". Vi ja scias, ke multaj el ni lernas tiun nacian lingvon. Ĉar en la tre facila Esperanto ni progresas pli rapide, sekvas el tio, ke per Esp. ni lernas la germanan. La E.-kurso el Radio-Wien estas kvazaŭ kompletiga por nia germano-kurso. Mi aldonas, ke per viaj prelegoj pri bela Aŭstrio vi vekas la grandegan deziron veturi tien. Vi konigas sciindajn vizitindaĵojn kaj forigas stultajn prijuĝojn. Mi povas atesti, ke dank' al viaj prelegoj Aŭstrio estas pli bone kaj pli ĝuste konata en niaj rondoj. Tial: daŭrigu, daŭrigu kiom eble plej ofte.

Plie, nun kiam kelkaj francoj hezitas kaj demandas sin: ĉu veturi al Varsovio tra Berlin, Praha aŭ Vieno? estas propra intereso de Aŭstrio, ke per Radio kaj Esperanto vi klopodu altiri al vi plej grandan nombron da kongresontoj. Malkaŝe mi parolis, ĉar mi konas vin amike kaj ĉar mi „amas" vian belegan landon kun ĝiaj montaroj, moroj, gastemeco kaj bonordo. **G. Saget, kemiisto-direktoro, Elbeuf.**

„... Mi estas tre malĝojigita, ĉar mi ne plu povas ĉiun lundon aŭskulti la ĉiam kun plej granda ĝojo aŭditan kortegan konsilanton Hugo Steiner. Mi devas konfesi, ke preskaŭ miaj okuloj malsekiĝis de larmoj, kiam mi sciiĝis, ke tiu plej ŝatata pioniro de la mondpacideo simile al la majstro Zamenhof mem volas demeti sian oficon kiel estro de la jam tiel longe kun la plej bonaj sukcesoj gvidita asocio. Kial estas kverelemaj, senkontentemaj en niaj vicoj, kiuj baldaŭ deziras tiun gvidanton baldaŭ ĉi tiun, same kiel la eksterstarantaj de la patrolanda fronto. En ni esperantistoj nur regu io pli alta, kion nur sentas, kiu estas tute sindonata al la Zamenhofa ideo. Mi supozas nur, ke la aliaj societoj enviis la bonan progreson sub via gvidado kaj komencis malhelpi viajn laborplanojn. Ĉar vi estas tiel nobla, vi cedis alian vian lokon..."
Alois Postl, bakaĵ-alportisto, **Hartberg, Stirio.**"

„... La aŭstriaj oficialaj instancoj ĝis nun estis en la intereso de sia mond-kaj fremdulfrekvento inter la gvidantaj nacioj por la granda progreso Esperanto kaj ni deziras esperi, ke tiel restu... **„Svisa Esperanto-Instituto, Bern: d-ro Spielmann.**

„Ni deziras, ke vi aranĝu novan E.-kurson per Radio, gvidota de vi, ankaŭ por ke niaj grupanoj povu lerni la germanan lingvon pere de Esperanto. **„Univ. Esp.-Steno-korespondanta Universitato: Radoslavov, Zlatarica, Bulgarujo.**

„La kontenteco, kiun via belega gazeto ‚Aŭstria Esp.' kaŭzas al mi, devigas min, sendi al vi la nunan leteron, petante, ke vi bonvolu akcepti miajn varmajn kaj sincerajn gratulojn, ĉar krom nia ideologio, vi faras servon al via ĉarma kaj bela lando. Tamen mi rimarkis kune kun ĉi-tieaj gesamideanoj, ke Radio-Wien bedaŭrinde ne komprenas vian afablan kaj patriotan klopodon, el kiu devenas tiom bona efiko por via patrolando... **N. Spaghadhoros, Kavala, Grekujo".**

Se vin logas la progreso,
Tuj aliĝu al Kongreso.
Varsovio vokas vin!

VARSOVION CERTE VENU! JUBILEON PARTOPRENU!

Internacia Ekspozicio Paris 1937.

Majo ĝis novembro.

Bela 4-paĝa prospekto en Esp.

Viena **Foiro** okazas de 5.—12. septembro

Foiro **de Paris.** Dum la lasta Foiro la standoj de la tranĉilfbrikaj de urbo Thiers informis per specialaj afiŝojn, ke la fabrikoj uzas E-on por la eksterlanda korespondado. La standon kaj la E.-reklamon organizis la urbestro de Thiers, s-ano Chastel, Puy-de-Dôme, kiu jam inaŭguris Zamenhof-straton en sia urbo.

Internacia Foiro Marseille, kiu okazos dum la dua dusemajno de septembro, invitas per E.-varbiloj kaj belaj glumarkoj.

Spritaĵo.

Juna bela fraŭlino devis esti operaciata pro inflamo de ceko. Kiam ŝi estis ĉe la profesoro, ŝi demandis lin, ĉu oni poste vidos la cikatron. La profesoro respondis: „Tio nur dependos de vi mem!" Trad. Schidloff-Wien.

Sportfestoj sur Lago de Wörth.

Sporto estas la kunigo de forto, beleco kaj lerteco de la korpo, metode regata kaj gvidata de la vigleco kaj viveco de la spirito. La pejzaĝo kun siaj mirakoj kaj delikataj donoj plej diversaj, ĝi estas la natura granda areno, en kiu la sporto povas prosperi plej bone. Jen senfina kampo por homa kuraĝo kaj lerteco! Se krome la pejzaĝo estas regata de la ĉarmo de la beleco, se ĉarmaj lagoj brilas en la ora sunlumo, se arbaroj kaj kampoj ĉirkaŭas la tuton kaj blua ĉielo volbiĝas super ĝi, tiam oni scias: Ĉi tie oni povas aranĝi festojn, festojn de refreŝiĝo, de l' sporto kaj de l' ĝojo. Ĉi tie muĝas la fontoj, je kiuj la spirito refreŝiĝas, la korpo fortiĝas kaj la bonhumoro kreskas. Tial eksteren kun la sporto en la pejzaĝon, el kiu la fortoj estiĝas, kiuj kapablas la homon, pli facile porti la ŝarĝon de l'ĉiutago.

Tiu sperto maturigis la ideon pri aranĝo de „Sportfestoj ĉe Lago de Wörth", kiuj nun okazas ĉiujare dum julio kaj aŭgusto ĉe Lago de Wörth. La lago mem donas al tio la nekompareble belan kadron: malmulte deklivaj arbarmontoj en freŝverda vesto borderas ĝin. Matantaŭe la deklivegaj limmontoj kun la grizaj rokoĉenoj elstaras. De la montarbaro blovas refreŝiga venteto. Sur la akvaro, de la lago ŝvebas la veloj; la bruado de la motorboatoj interrompas la trankvilecon, kelkfoje ankaŭ la granda akvobirdo, ŝvebas alte en la aero kaj portas sur sia dorso mirantajn pasaĝerojn. De malproksime oni aŭdas la komandovortojn de ekzercantaj remantoj. En la naĝstadiono ekzercas lertaj naĝantoj kaj saltantoj kaj sur la tenisludejoj kaj sur la golfludejo regas vigla vivo.

Granda, eleganta ŝipo faras siajn sulkojn tra la akvaro. De Klagenfurt-See ĝi direktas sian kurson al la en verdaĵo kaŝitaj lagobanlokoj Maiernigg, Krumpendorf, Sekirn kaj Reifnitz, poste ĝi alproksimiĝas al Maria-Wörth, kiu sur duoninsulo etendiĝas malproksime en la lagon. Majeste rigardas trans la akvaron la pli ol 1000-jara miraklopreĝejo Maria Wörth, ornamita per freskoj el karlida epoko, vidinda kulturverko en



Maria-Wörth. Kliŝo: Ö. V. W.

Karintio. Ĉe la supra parto de la lago la noblaj kuraclokoj Pörtschach kaj Velden, la centroj de sportaj kaj societaj aranĝoj. En ĉiuj bordbanejoj de la lago regas laŭta, gaja vivo.

Ĉi tie ĉe la Lago de Wörth renkontiĝas dum Sportfestoj ĉe Lago de Wörth la sportentuziasmaj konkurantoj, por mezuri siajn rekordojn en remado, velado, naĝado kaj saltado, en golfo kaj teniso, en piedpilko, luktado, skermado, pafado, rajdado, vetkuradoj ktp. Ĉi tie estas kulturata sporto altkvalita, sporto en plej nobla maniero, ĉi tie estas montrate, kiom multoble la kapableco de l' korpo povas evolui, ĝia forto kaj movebleco kaj eleganteco. Ĉi tie oni povas vidi kiel riĉa la beno pro sportkulturado estas, kiu konservas la korpon juna, elasta kaj la spiriton freŝa kaj movebla. Vidindaj prezentadoj de popolmoroj, gajaj vilaĝfestoj, bordfestoj kaj dancaranĝoj forigas la malagrablajn pensojn kaj donas al la vizitanto de la sportfestoj novan vivokuraĝon kaj vivoĝojon.

Sed ankaŭ la alia Karintio valorasesti vizitota. Veturado al belega Lago de Millstatt, al Ossiach-, Weissen- kaj Faakerlagoj, kiel ankaŭ al la aliaj ĉarmaj, multnombraj varmakvaj banlagoj, aŭ supren al la mirakla Heiligenblut kaj Grossglockner, migrado al la kulturlokoj de la lando, unuavice al la katedralo en Gurk kun multaj artvaloraĵoj kaj al la plej antikva kristana konstruaĵo en Karintio, al la katedralo en Maria-Saal, al la surmonta kastelo Hochosterwitz, kiu kiel „Gral"-kastelo tronas sur kalkokeglo, aŭ ekskurso al la antikva dukourbo St. Veit, al la burgo-urbeto Friesach aŭ al „Zollfeld", kiu rakontas pri la antikva historio de la lando, — montros al li la proprecon kaj variecon de la lando. Kiu poste de la nobla montosporto estas supren pelata, supren al roko kaj glacio, kaj de tie elrigardas al la vasta Karintio-lando, tiu estos kortuŝita kaj movita pro la unika rigardo de la montarregiono, el kiu la multaj malsekbluaj okuloj de la Karintiaj lagoj brilas al la ĉielo. Al lie evidentiĝas: Karintio, la germanlingva limdistrikto en la sudo de Aŭstrio estas unu el la plej belaj partoj de la germanlingvaj landoj.

Kiu deziras ĝui belan landon kaj ĉeesti la sportfestojn, venu. Informojn ĉe Landesverkehrsamt en Klagenfurt.

Argentina Nacia Himno.

Aŭdu, popolo, la sanktegan krion:
Liberec'! Liberec'! Liberec'!
Aŭdu de l' ĉenoj rompitaj la bruon,
Vidu la noblan sur tron' egalec'.

Jam sian tronon indegan starigis
L' Unuiĝintaj Provincoj de l' Sud'
Kaj liberuloj de l' mondo respondis
Al Popol' Granda Argentina, Salut'!

Enernaj la laŭroj estu,
Kiujn konkeris ni, por
Ke kronitaj de gloro ni vivu
Aŭ juru ni mortu kun glor'.

Esp-igis H. Bobbiesi.

Interesaj kutimoj.

En Norvegujo estis kutimo ĝis antaŭ 100 jaroj, ke ĉe entombigoj la homoj el la funebra sekvantaro, unu post la alia, iris al la ĉerko kaj petis la mortinton je pardono pro tio, kion ili estis pekintaj kontraŭ li.

En Bretagne ekzistas ankoraŭ nun simila kutimo. Tie iras junaj geamantoj, kies gepatroj jam estas mortintaj, kune al la tomboj kaj informas la mortintojn, ke ili havas la intencon geĥanĉiĝi.

Multaj japanoj kredas, ke alportas malfeliĉon, meti la kapon dum la dormado norden. Ili estas tiel superstiĉaj, ke multaj kunportas kompason, kiam ili estas dum vojaĝo kaj devas tranokti en fremda loko.

Malgranda rakonto.

En la biletvendejo de Berliner Theater, kies artistaj prezentadoj malboniĝis, pendas afiŝo „La kunprenado de hundoj malpermesata". Teatrokritikisto preterpasis kaj skribis sub ĝi: „Societo por protekti la bestojn."

Recenzoj.

SAT, Paris. Novaj eldonaĵoj:

„Komunista Manifesto", 3. eld., de Marx kaj Engels kun antaŭparolo de konata ekonomisto Lucien Lora. 56 p., 12.18 cm, 3 fr. fr. afranko por ĉiuj libroj 10%.

„Juneca Ardo", originala rakonto de N. Bartelmes, priskribante en romana formo la vivon de du junuloj el la tempo post la mondmilito. 120 p., 13.19 cm, 7.50 fr. fr.

„La Laborista E.-Movado antaŭ la mondmilito", historia skizo de G. P. de Bruin, 36 p., 14.20 cm, 4 fr. fr.

„Frateco en la vivpraktiko" de Henrieta Roland Holst v. d. Schalk, trad. H. A. Buis, 28. p., 11.15 cm, 1.50 fr. fr.

„Nia Programo", perioda informilo de Propaganda Komitato, Japana E.-Instituto, Hongo-Tokio, novaperis.

En la naciista Hispanujo.

Iru serĉi interpretiston. La kaptito nur parolas hispanlingve.

Anoncoj.

Anoncoj havas plej bonan efikon, ĉar la gazeto eliras al 122 Landoj; 2-linia ŝ 2.—, ĉiu plua linio ŝ 1.—.

Van Weeren, Heemstedestrato 11/II, Amsterdam, Nederl. dez. koresp. kun ĉiuj landoj.

J. Koehorst, Parklaan 61, Harlem, Nederl. dez. ŝanĝi poŝtm. kun ĉiuj landoj (Michel Yvert).

S-ano Jizo, 3 Siao Chiao Chang en Si-men **Soochow**, Ĉinujo, dez. kor. k. interŝanĝi belajn fotojn kun Ameriko kaj Afriko.

Halo! Radio Tallinn! E.-kurso komenĉiĝis la 7. julio. Gratulon!

No. 8/9 aperos la 25. augusto.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: **Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg,** Bundesstraße 154. – **Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer", Wien, VII., Bandgasse 28.**

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist“
Mitteilungsblatt für die Mitglieder des **Oesterreichischen Esperanto-Bundes**
und der **I. E. L.-Jugend**
Nr. 7 (22) Juli 1937
Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Lernu Esperanton!

Esperanto estas arte-farita lingvo, ekzistanta depost 1887 kaj disvastigita en pli ol 120 landoj (nia gazeto eliras al 122 landoj), kiu sin montris bonege taŭga kiel interpopola interkomprenigilo por leterinterŝanĝo, dum vojaĝoj kaj en la 28 Universalaj Kongresoj de Esperanto kiel ankaŭ en aliaj kongresoj.

Esperanto ne celas forpuŝi la naciajn lingvojn, sed ĝi fariĝu krom la gepatra lingvo la dua lingvo por ĉiuj, kiuj havas interrilaton kun anoj de aliaj nacioj.

Esperanto ŝirmas la gepatrajn lingvojn. Ĉiu nacia lingvo havas la rajton, esti samalte taksata kiel ĉiu alia kaj Esperanto efikas tion, ĉar ĝi donas la eblecon, ĉie, kie en la interpopola rilato la propra gepatra lingvo ne sufiĉas, uzi Esperanton kaj ne la lingvon de la alia popolo anstataŭ la propra.

Esperanto estas de la popoloj malpli nuance prononcata ol tio okazas ĉe la plej multaj aliaj lingvoj, ĉar la prononcado estas fonetika (laŭsona).

Esperanto estas pli facile lernebla ol iu ajn nacia lingvo. Ĝi estas belsona facile parolebla kaj facile skribebla. Ĝia gramatiko konsistas el nur malmultaj nešanĝeblaj reguloj.

Esperanto prenis siajn vortradikojn laŭeble senŝanĝe el la naciaj lingvoj. Ĝi uzas la plej uzatajn fremdvortojn ekster la gepatra lingvo kaj plifaciligas — kiel unua fremdlingvo — la lernadon de pluaj lingvoj.

Pro tio ĉiu lernu Esperanton!

Varbu jam nun ĉe viaj konatoj por kursoj en aŭtuno!

Krom buŝaj kursoj en Wien kaj multaj lokoj en la federaciaj landoj, eldoniĝos nova skriba kurso por tiuj, kiuj ne povos frekventi kursojn. La prezo por ĝi estas tre malalta. Sinancoj por la skriba kurso kaj por la buŝaj kursoj en aŭtuno jam nun al nia gazeto!

Informojn kontraŭ respondafranko!

Lernt Esperanto!

Esperanto ist eine seit 1887 bestehende, in mehr als 120 Ländern verbreitete, künstliche Sprache (unsere Zeitung geht nach 122 Ländern), die sich als zwischenstaatliches Verständigungsmittel im Briefwechsel, bei Reisen und bei den 28 Esperanto-Weltkongressen sowie bei anderen Kongressen glänzend bewährt hat.

Esperanto bezweckt nicht, die Nationalsprachen zu verdrängen, sondern es soll neben der Muttersprache die zweite Sprache für alle werden, die Verkehr mit Angehörigen anderer Nationen haben..

Esperanto schützt die Muttersprachen. Jede Volkssprache hat ein Anrecht daran, gleich hoch wie jede andere geschätzt zu werden, und Esperanto bewirkt dies, weil es die Möglichkeit gibt, überall, wo die eigene Muttersprache im zwischenvölkischen Verkehr nicht ausreicht, sich des Esperanto zu bedienen und nicht der Sprache des anderen Volkes an Stelle der eigenen.

Esperanto wird von den Völkern weniger verschieden ausgesprochen, als dies bei den meisten anderen Sprachen der Fall ist, weil die Aussprache lautgetreu ist.

Esperanto ist viel leichter zu erlernen als irgendeine Nationalsprache. Es ist wohlklingend, leicht zu sprechen und leicht zu schreiben. Seine Sprachlehre besteht nur aus wenigen unveränderlichen Regeln.

Esperanto hat seine Wortstämme möglichst unverändert aus den nationalen Sprachen entnommen. Es verwendet die gebräuchlichsten Fremdwörter außerhalb der Muttersprache und erleichtert — als erste Fremdsprache — das Erlernen weiterer Sprachen.

Daher lernet jeder Esperanto!

Werbet schon jetzt bei Euren Bekannten für Herbstkurse.

Nebst mündlichen Kursen in Wien und vielen Orten in den Bundesländern, erscheint ein neuer schriftlicher Kurs für alle jene, die nicht in der Lage sind, Kurse zu besuchen. Der Preis hierfür ist sehr nieder gehalten. Anmeldungen hierfür und die Herbstkurse schon jetzt an unser Blatt!

Auskünfte gegen Rückporto!

Nachtgedicht von Petro Preradović

(Aus dem Kroatischen.)

Rundum tanzen helle Sterne
Auf der blauen Himmelsrunde,
Tanzen leise nur und sachte,
Um die Erde nicht zu wecken;
Denn die Erde ist ermüdet
Von der Arbeit vieler Hände,
Von dem Wandern vieler Füße
Und dem Schlagen auch der Herzen.

(Freie Uebersetzung von E. Werner.)

Nokta Poemo de Petro Preradović.

(El la Kroata.)

Ronde dancas helaj steloj
Sur ĉiela blua rondo,
Dancas nur mallaŭte, dolĉe,
Por ne veki nian teron;
Ĉar la tero estas laca
De la manoj laborintaj[1]),
De l'piedoj iradintaj[2])
Kaj de koroj, kiuj batis[3]).

---

[1]) Die gearbeitet haben,
[2]) Die gewandert sind.
[3]) Die geschlagen haben, (die schlugen).

Die verschiedenen Vergangenheitsformen sind hier wohl nur aus Gründen des Versmaßes gewählt worden.

Capitro el la gramatiko:

1. **Regulo:** Per la sufikso — ec oni faras el adjektivo abstraktan substantivon: bela — beleco; juna — juneco; vera — vereco. — Nur escepte la sufikso „ec" estas aplikebla al alispecaj vortradikoj, ekz.: la morteco de la homoj, la okazeco de la homa animo (kontraste al antaŭe supozita stateco).

2. **Helpregulo:** — ec estas aplikbla, se genitivo (de la ... aŭ poseda pronomo) sekvas aŭ estas aldonebla, ekz.: la vero, sed: la vereco de liaj asertoj (ilia vereco); la bono (generale), sed: la boneco de tiu verko (ĝia boneco). Komparu jenajn ideojn:
   a) memstare, **sen sufikso: la vero,**
   b) kunlige kun gen. **eco: la vereco,**
   c) memstare, ne generale, sed konkrete **ajo:** la verajo (io vera).

3. **Konsilo:** Prefere uzu nenian sufikson, ol malĝustan! Evitu — ec, se pli konkreta sufikso estas aplikebla. Ekz.: „juneco", nur se temas pri vera eco, ekz.: Lia nepripensita faro estas aljuĝebla al lia juneco. Sed anstataŭ „en mia juneco" preferu „en mia junaĝo". Do la germana vorto „Jugend" estas tradukebla per tri formoj, laŭ la senco: juneco, junaĝo, junularo.

4. **„eca" kaj „ece":** Tiuj misformoj estas preskau ĉiam superfluaj, do ege evitindaj (Car la re-adjektivigo de abstrakta substantio rezultigas nur la originan adjektivon, boneca = bona, nek pli, nek malpli): Maljunulo ne parolas junece, sed junule (kiel aŭ kvazaŭ junulo). Vi ne povas senti vin hejmeca, sed hejma. Konsternita homo ne havas vitrecan rigardon, sed simple vitran rigardon (aŭ: rigardas vitre). Anstataŭ „sanecaj institucioj" oni povas diri „san-institucioj" aŭ „institucioj pri saneco".

Kiel bedaŭrinde disvastiĝas tiuj misformoj, montru jenaj ekzemploj de superfluaj „eca" el cetere bona traduko de serioza verko: „senedzeca vivado", „imperiestreca grandiozeco", „certeca" (!), „sanktuleca", k. t. p. Same kiel abundas en la germana lingvo la misuzo de „ung", tiel en Esperanto „eco" kaj „eca" minacas sufoki la freŝan fluadon de la sanenaskita interkomprenilo.

Tial evitu tiun kiel ĉiujn nenecesajn sufiksojn!

E. Werner.

Sehr wichtig!

Werben Sie schon jetzt für die **Herbstkurse** (auch schriftliche Kurse)!

Alle Auskünfte gegen Doppelkarte von Aŭstria Esperantisto, I., Neue Burg.

IEL-Junularo.

La statutoj jus estas konsentitaj de la kancelierejo (N-ro 332.452 G. D. 2).

Jen la ĉefaj ideoj koncerne IEL-J:

Sidejo en Wien, **agosfero** Aŭstrio. Aliĝo de similaj Ligoj en aliaj landoj estas antaŭvidata.

Celoj: Kolekti la gejunulojn inter 14—21 jaroj, instrui ilin en Esperanto, gvidi ilin en la korespondado, en la ideointerŝanĝoj, ebligi al ili — kiam venos pli bonaj cirkonstancoj — iri eksterlanden, eduki ilin al amo kaj disciplino al ilia patrolando, instrui ilin en la kono de ilia hejmlando, en la arto fari paroladon, en fremdulvarbado, en traduko el kaj en Esp., en la komparo de E. kun la gepatra lingvo kaj per tio en la enpenetrado en la sencon kaj animon de la gepatra lingvo. Sed ankaŭ la korpa plifortigo necesas: gimnastiki, fari ekskurson kaj sporton.

IEL-Junularo estas simila al la skoltoj kaj pro tio ni nun petos la permeson por aparta simpla uniformo.

IEL-J. konsistas el grupoj de almenaŭ 5 membroj kaj unuopaj personoj.

La negocojn gvidas la „Regno-gvidisto", kiu eknomas sian anstataŭanton, kasiston kaj sekretarion. Li ankaŭ eknomas la „Lando-gvidisto"-jn kaj laŭ ilia propono la „Grup-gvidisto"-jn. La Lando-gvidisto eknomas la „Trupestro"-jn kaj „Arestro"-jn.

La **unua** grupo fondiĝos nun en **Linz.** Mi eknomas s-anon **Josef Kugler,** poŝtinspektoro en Linz, kiu estas la iniciinto de ĉi tiu fondaĵo, **„Anstataŭanto de la Regno-gvidisto"** kaj **„Lando-gvidisto por Supra Aŭstrio"** kaj **Johann Aufreiter, „Grup-gvidisto por Linz".**

Gvidistoj kaj Trup-estroj nur povas esti plenkreskintaj s-anoj, membroj de IEL, „Arestroj" apartenas al la gejunuloj.

Aŭstrianoj, kiuj volas helpi al la E.-movado, helpu al la pligrandigo kaj plifortigo de IEL-Junularo, ĉar el ili ni deziras formi la batalionon por nia varbado inter la loĝantaro kaj bonajn membrojn de niaj asocioj esperantistaj. Petu la statuton, kiuj por interesuloj estas senpage riceveblaj de mi.

Sidejo de IEL-Junularo: Wien, Neue Burg.

La **Regno-gvidisto:** Steiner.

Internacia Esperanto-Ligo
ĉefdel. G. Weber, Wien, I., Neue Burg.

Nia **bela jarlibro** estas havebla kontraŭ pago de S 5.— (AEA.-membroj nur 4.40) por membroj kun jarlibro, 12.50 (AEA. 11.95) por MA. (kun jarlibro kaj monata gazeto), S 24.— (AEA. 23.45) por MAH. (jarl. kaj semajna Heroldo).

En multaj lokoj ne estas **delegitoj, Aŭstrio ne postrestu aliajn landojn!**

La belegaj **IEL.-sigelmarkoj:** 50 kun afranko 65 g, 100 S 1.25.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Reg.-Rat Fritz Stengel
Wien, XVII., Syringg. 3.

Kunsidoj: 3 estrar — kaj 1 ROKO.

Varbsemajno. Dum 27. sept.—16. okt. almenaŭ ĉiu grupo kaj izolulo propagandu. La devizo: Oni aŭdu pri Esperanto! Meze de oktobro komenciĝu kursoj, laŭeble pli frue ol la aliaj lingvokursoj. Preparu jubilean propagandan festaranĝon: festparolado, muziko, kantado.

Flugfolioj. RK eldonos malmultekostajn; la grupoj ricevos ĝis komenco de septembro kvanton da ili.

Ilustritaj flugfolioj. Car bildoj pli konvinkos ol vortoj, ni eldonos ilustritajn t. e. poŝtkartformatajn kajerojn kun propagandbildoj. Pro la malfacileco de havigo de taŭgaj klišoj ĉi tiuj kajeroj ne aperos antaŭ vintro.

Esperanto-poŝtkartoj. AEA eldonos tiajn laŭ modelo de AEF-kartoj. Detaloj sekvos.

Stacidom-tabuloj Tiaj tabuloj (AEA komune kun ALLE) ekzistis siatempe, sed pro la altaj kostoj malaperis. Sed, ĉar estas grave, ke fremdulo, veninta en urbon, jam en la stacidomo vidu E.-tabulon kaj ke E.-o vivas en la urbo, ni proponos al RK en komuna agado la aranĝon de varbefikaj afiŝoj (stelo, terglobo kun „Esperanto" en la eldono de „Heroldo") kun la nomoj de ĉiuj grupoj sen alia teksto. Ni esperas ricevi rabaton de la lukotizo.

Propagandaj tabuloj — murgazeto. Propagandaj tabuloj aŭ kestetoj signifas malmutekostan reklamon kaj anstataŭas preskaŭ afiŝojn. AEA provos havigi al la membroj plaĉajn malmultekostajn tabulojn. Kiel ekspozaĵoj servu: Aŭstria Esp., 2te Sprache, prospektoj ktp., kiujn AEA regule liveros al la mendantoj senpage kune kun ekspoziciplano. Detaloj sekvos.

Murekspozicio. Por propagandi en foiroj, popolfestoj ktp. ni decidis fabriki — ev. en la kadro de RK — murekspozicion t. e. ekspozicio de varbmaterialo, gluita sur grandaj afiŝoj, landkartoj kun la lokoj de IEL-delegitoj ktp. Tia ekspozicio estos tre taŭga propagandilo kaj ne bezonas prizorgadon.

Slosiloj, Steloj, Aĉetu la ŝlosilojn (malgrandaj gramatikoj), vortaretojn germane-Esp., po 10 g plus afranko. Bonega propagandilo! Ĉu ĉiu grupo posedas provizon da steloj?

Adresaro. Ĉiu membro de AEA estu ankau en la Adresaro. Anoncu vin baldaŭ. Sendu la monon S 1.20 ankaŭ en poŝtmarkoj (per ĉeko aldonu 5 g) al Intern. Esp.-Muzeo, Wien, I., Neue Burg.

Glu-slipoj kaj-markoj. Ni disponas ankoraŭ pri malgranda kvanto de gumitaj flugfolioj (juĝoj pri E. k. s.), kiuj distranĉitaj bone propagandas sur leteroj kaj poŝtkartoj. Ĉe mendoj de objektoj laŭ mendo kaj provizo kvanto da slipoj kaj markoj senpage.

Gazetservo. Ni sendis al la aŭstria gazetaro informojn pri: „Eksterlandano pri Esp., Int. Konferenco en Paris, E. en nederlanda gazetaro.“ La gazetreferanto petas informon, en kiuj gazetoj aperis la artikoloj.

Raportoj. Sendu raporton por publikigo en 2te Sprache.

Vivu en paco! La estraro devis sin okupi lastatempe multe pri kvereloj en fora grupo. Ni rekomendas labori en paco kaj likvidi eventualajn internajn malakordojn. Ni estu esperantistoj.

RK-ekskurso al Bratislava. La ŝipekskurso, bone aranĝita de AEF, okazis la 20. junio. Partoprenis 280 personoj, kiujn atendis en Bratislava samideanoj kaj du ĉarmaj infanoj kun flagoj. Salutis reprezentanto de la urbkomunumo kaj de la lokaj grupoj, inter ili d-ro Kamaryt. Prez, Stengel dankis nome de RK. Senpaga vizitado de la moderna agrikultura muzeo, kies direktoro klarigis la objektojn, kaj poste marŝado tra la bela kaj moderne evoluiĝanta urbo. Komuna tagmanĝo kaj tro frue, je la 16 h. post kora adiaŭo la reveturo. La partoprenantoj estis plene kontentigataj per laŭtparolilprezentadoj de Verda Teatro kaj muziko sur la ŝipo.

Persiste ni laboru!

Aŭstria Esperanto-Instituto sub la gvidado de Reprezenta Komitato de la aŭstria esperantistaro komencos en septembro jenajn kursojn: a) preparkurson al la ŝtata ekzameno por la instrukapableco (novembro-ekzameno), b) mallongan preparkurson por kursgvidantoj, kiuj deziras komenci kursgvidadon en aŭtuno. Pluaj detaloj sekvos. Adreso: Oest. Esp.-Institut, Wien, XVIII., Escherichgasse 5.

Linz. Supra Aŭstria esperantista societo neŭtrala en sia 11. ĝen. kunveno havis jenajn novelektoin (21. V.): Prez. dir. Wanneck, vicprez. Mraz, sekr. dir. Haider, kas Tröbinger, bibliot Minna Kugler, propag. insp. Kugler, kasorevizoroj Trude Gothmann kaj Schwarzenbrunner. En la lasta jaro okazis 50 kunvenoj kaj 2 festvesperoj, kursoj por poŝtofic., privata kaj perfectiga. Haider.

Wien. Esperanto-Klubo kunvenas dumsomere en laktejo „Wiener Molkerei“, Prater, Hauptallee 3, ĉiun mardon 18.30—21.30. — Nia membraro preskaŭ atingis 100. Lastaliĝis s-anino Lia Russmayr, kiu venis el Straßwalchen. Si sola lernis E-on kaj gvidis kursojn ofte sub malfacilaj cirkonstancoj en diversaj lokoj inter Vöcklabruck kaj Salzburg. Ni kore salutas ŝin, kiu ankaŭ nun helpas en la laboroj en la Muzeo. Krome aliĝis s-ano Eder, studento en la Altlernejo por Terkulturo.

Ekskurso. Esperanto-Klubo ekskursos la 18. julio al Burg Kreuzenstein. Veturebleco per tramo ĝis la punkto, kie la tramo devojiĝas al Strebersdorf kaj de tie piede al Korneuburg (1½ h) aŭ trajne (revenbileto rabatita). Renkontiĝo je la 10 h antaŭ la urbdomo en Korneuburg. Manĝon kunprenu. Gastoj bonvenaj!

Wien. Katholika Unuiĝ Esperantista post la ferioj kunvenos, I., Stefansplatz 2/II (Reichsbund kathol. Jugend).

Wien. E.-Soc. **„Danubio“** dum julio-aŭgusto kunvenas en la ĝardena Lakto — kaj Kafo-Paviliono en Ressel-Park, Wien, IV., Karlsplatz je 19.30 h, ĉiam kun prelegprogramo. Gastoj bonvenaj.

Mortis s-ano **Pastro Anton Rosenberg,** en Bratelsbrunn, CSR., longjara nia abonanto.

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien aranĝos en la dua parto de septembro **ekspozicion** por varbi al la kursoj en Wien.

Karaj legantoj!

Ni invitas vin aliĝi al la landa Asocio „Aŭstria E.-Asocio“ kaj per tio al IEL. Necesas, ke en ĉiu loko de Aŭstrio estu delegito de IEL. Informojn donas la ĉefdel. G. Weber. AE: Steiner.

Al la grupoj kaj izoluloj en Aŭstrio.

Mi intencas fari varbadvojaĝon en Aŭstrio en septembro. La kostoj estas probsimume S 5.— por la vojaĝo kaj gastigo dum la unutaga faros lumbildparoladon kaj samtempe restado. Mi varbadan por E.-kursoj. Interesoloj skribu tuj al mi per respondkarto, por ke mi povu aranĝi la vojaĝprogramon. La vojaĝo okazos nome de AE. Steiner.

Hejmo por Patriota Fronto.

En radio-parolado la ĝeneral-sekretario de P. F., ŝtatsekretario Zernatto alvokis al donacado por konstrui por Patriota Fronto propran hejmon en Wien.

Mi tuj sendis S 10.— al la ŝtatsekretario por ĉi tiu celo kaj nun alvokas ĉiujn niajn legantojn aŭstriajn al donacado. La plej malgranda sumo, eĉ nur groŝoj, estas danke akceptotaj kaj publikigotaj.

1. listo.

S-ro Schidloff, Wien ŝ 2.—.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer“, Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28.